



SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 9 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

3-a Kvaronjaro 1978

N° 68

AUTUNA KUNVENO

DE LA FEDERACIA KOMITATO



Ĝi okazos en Narbonne, ĉe la Junuldomo, Placo Roger Salengro, dimanĉon la 22-an de oktobro, je la 9-a.

Necesa estas la ĉeesto de la komitatanoj kaj bonvenaj estos ĉiuj gesamideanoj Dum nia jarkongreso en Sète, triono de la federacia komitato estis reelektita kaj sekve, en Narbonne, la komitato devos elekti la federacian estraron.

D-ro SALAN intencas prezenti novan planon por "Sudfrancia Stelo" kaj ni parolos pri la pligrandigo de nia pariza sidejo.

Partoprenintoj de diversaj adventoj certe raportos, kaj kiu havas pritraktotajn temojn bonvolu skribi al mi por enskribo en la tagordo .

Pro ioma anticipo necesa por diskonigi tiun ĉi cirkuleron ĉefe pere de nia federacia bulteno, nia amiko, Maurice DELIGNE (3 C Rue Paul Ramadier, Narbonne) ne povis definitive plani la komunan tagmanĝon. Do, por plifaciligi lian taskon, necesas ke, plej baldaŭ kiel eble kaj ĉiukaze antaŭ la 15-a de oktobro, oni rilatu kun li por rezervi la deziratajn sidlokojn por la komuna tagmanĝo.

Kiu grupo pretas gastigi la venontjaran federacian kongreson ?

Ĝis revido en Narbonne la 22-an de oktobro.

Kun plej amikaj salutoj de via

Jean AMOUROUX

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

BONA PROPAGANDO en ne-esperantistaj MEDIOJ !

La kvina Internacia Konferenco de Popola Kulturo kaj Konstanta Edukado kiu okazis de la 14-a ĝis 15-a de Septembro en la palaco de UNESKO en PARIZO estis la okazo por S-ino Despincy-Zochoriska (Pola) raportiti en esperanto; Jean Guillaume tradukis franclingve.

Ankaŭ S-ino Woesslink-Nagata (Japana) parolis en Esperanto kaj René Llech-Walter faris tujan francan tradukon.

Akcepto ĉe la urbdomo de Parizo kaj ĉe la Senato kun ĉeesto de Ministro atestas pri la prizorgado de la oficialaj instancoj por tiu konferenco.

La proksima internacia konferenco okazos en 1980 en BERNO (Svislando).

Ĉiujn informojn donas Pierre PETIT, 16, Place de la République, 75010 PARIZO.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

SOCIOLINGVISTIKO KAJ ESPERANTO

S-ro BERNARDO, sekretario de la Instituto de esplorado pri scienco, de la Komunikado kaj Edukado ĉe la Fakultato en Perpignan (Francio) telefonis al S-ro René LLECH-WALTER por lin informi, ke profesoro VASSAILS, eksdekano de la Universitato de Tananarive, nun profesoro ĉe la Universitato de Perpignan, interesiĝis pri Esperanto kaj petis, ke oni, oficiale, enskribu la demandon pri lingvo internacia dum la venonta internacia seminario. Propono akceptita .

La prelego farita de la delegito de U.E.A. en Perpignan ĉe la unua internacia seminario pri sociolingvistiko estis do efikoplana .

A . V .

nimes

Kvin gelernantoj de S-ino Volpelière vizitis Greziljonon ĉisomere :

Ges-oj Guillaume unu semajnon en Julio, S-ino Chaudouard, Mounier, Soulier, tri semajnojn en Aŭgusto.

Ges-roj Guillaume studis nian lingvon unu jaron; jen iliaj impresoj pri sia restado :

GRESILJONO, kastelo en la regiono de la luaraj kasteloj, du kilometroj de BAUGE sur la vojo al Le Lude : oni eniras tuj en la parkon, kiu estas vasta laj florkava. Estas bela domo kaj bieno de la esperantistoj.

Ni decidis resti unu semajnon : la unua sperto devas esti mallonga.

Dum la tago, ni havis duhoran kurson; ni estis en la mezgrada klaso : 15/20 gelernantoj de ĉiuj aĝoj kaj diversaj naciecoj (la duono estas franca, la duono alilanda). Nia juna instruistino malavare donis al ni siajn konojn afable kaj pacience.

Sed la tago estis plenigita per diversaj okupadoj : tiuj kiuj povis donacis siajn konojn al aliaj, aŭ sian "violonon de Ingres".

La manĝaĵoj estis simplaj sed bongustaj, kaj la etoso gaja. La dormoĉambroj komfortaj ebligis al ni kvietajn noktojn.

Mi hezitas diri ke, se ni parolis esperanton kun alilandanoj, ni iomete "krokodilis" kun la francoj ! Tamen ni certe faris progresojn, sed precipe ni aŭdacis paroli esperanton. Estis bona kaj tre agrabla eksperimento .

-X-X-X-X-X-X-X-X-

S-ino Mounier studis jam tri jarojn. Tion ŝi diras al ni :

Gresiljono 1978 -

" Ĉu vi scias kio estas printempo ?" demandis Markizino de Sévigné.

Kaj vi, Ĉu vi scias kio estas Gresiljon ? Nia bela kastelo, kie Ĉiu sentas sin Markizo aŭ Grafo, estas, en somera sezono, la Printempo de nia verda idealo . Printempo ja, kaj Espero kaj Fido !

Ĉijare, dum la dua periodo, partoprenis preskaŭ cent samideanoj tre diverslandaj, kvankam kutime nur la unua periodo estas vere internacia. Kaj jen la miraklo de Gresiljon : en ĝi renkontiĝas esperanta vera familio : avo 87-jara kun belsona voĉo, paro de junaj plenkreskuloj, kelkaj eminentuloj, sed ankaŭ dudekono da junuloj tre valoraj esperantistoj (jen la printempo de nia movado, pri kiu oni ekkonscias en Gresiljono), kaj la semoj : infanoj, oĉ beboj (4-jara Nikolao kriante ĉiumatene "Saluton! en la manĝoĉambro).

Laborema familio : tri kursoj gviditaj de spertaj instruantoj, riĉa kaj serioza biblioteko, aŭ distraj konversaciaj rondoj : pli ol dudek partepranantoj runde sidantaj sub la arboj aŭ en salonodiskutis pri diversaj temoj.

Ankaŭ la vesperkunvenajn temojn proponis kaj organizis la ĉeestantoj. Ni mem aŭdacis prezenti per lumbildoj " Nimo, franca Romo". Kelkaj samideanoj gratulis nin, ĉar, ĉu ili malkovris famaĵojn malbone konatajn, ĉu, kiel tiu sveda paro ĵus alveninte de Nimo, ĝuis pro revido de famaj monumentoj. Amikino nia sentigis per kantanta voĉo la prononcmankon de nia regiono, dirante esperantigitan poemon.

Ĉu nenio mankas en Greziljono ? Ŝajnas al ni ĉijare ke mankis ja muziko, almenaŭ pli ofta praktiko de muziko, malgraŭ provoj de norvego, kiu violonis popolajn dancojn kaj de germanino kiu flutis klasikajn ariojn. Ankaŭ dancoj estis maloftaj, krom la prezentadoj de norvega kaj skota folkloro.

Do iru ni en Greziljonon, kantu ni, kaj amu ni !

-X-X-X-X-X-X-X-X-

Ni aldonu, ke S-ino Chaudouard sukcesis la Ateston pri Elementa Lernado, kaj S-ino Soulier la Ateston pri Praktika Lernado .

REKOMENDOJ de la AKADEMIO el «Aktoj de la Akademio (1968-1974)»

P R I L A R E F L E K S I V O

Regulo

I.- La reflektivaj pronomoj rilatas nur la 3-an personon kaj resendas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki infinitivo, a-finaĵa participo kaj substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.

II.- Iafoje la vera subjekto lasas sin vidi per onmeto de la vortoj "kiu(j) est-" ekz-e ĉe apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (ekz-e : "kastelo fama pro sia historio" - sed "li ekvidis sian fraton Benjaminon, la filo de lia patrino". t.e. Benjaminon, kiu estis la filo de lia patrino).

III.- Ekzistas tradicie sankciitaj vortkunmetoj kaj frazeroj, en kiuj la reflektivo funkcias absolute, sen rilato al la agsubjekto, ekz-e "siatempe" ktp.

IV.- Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.

Gvidaj Ekzemploj

I.- A.- Infinitivo enkondukas

La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin por la ceremonio.
La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin pli dece.

B.- A - Finaĵa participo enkondukas

Ŝi ekvidis viron staranta antaŭ ŝi.
Ŝi ekvidis starantan viron antaŭ si.

C.- Substantivo de verba deveno enkondukas

Ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj.
Ŝi ribelis kontraŭ la interveno de edzo en ŝiajn aferojn.

II.- Li evitu la trinkaĵojn povii tro acidajn.
Ĉiu konas homojn nur por si indulgajn.

III.- Moki ies fidon al si mem.
Oni komprenis liajn gestojn per si mem.
Ni ne povas koni la realon en si mem.
Metu ŝion en sian lokon.
En ĉiu kranio estas sia opinio.

--X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X-X--

LA MALJUNA FRAŬLINO , LA NIGRA KATO kaj LA BONKORA FEINO

Maljuna fraŭlino vivis sola en vilaĝa dometo. Ŝin kunestis mezaĝa, nigra kaj dika, tre dika kato, kiu pasigis la tagojn kuŝante sur la magraj femuroj de sia mastrino kaj la noktojn dormante sur ŝia lito apud ŝi.

Tiu kata kunestado tre plaĉis al la maljuna fraŭlino, kvankam ĝi kompreneble ne kapablis plenumi ĉiujn ŝiajn dezirojn.

Tial tre ofte, kiam la tagoj malheliĝis, post la sunsubiro, dum la vesperaj horoj, la dika kato sur siaj genuoj, ŝi laŭvoĉe lamentis pro sia soleco, pro sia fuŝita juneco, pro sia ~~plenkreska~~ tutviva virgeco.

Iun vesperon, ŝi eĉ bruege plonĝemis kaj la kato ĉesigis sian ronradon.

Tiam subite ekaperis en malluma angulo de, la ĉambro stelplena kaj brilega Feino, kiu-celante ŝin kvietigi proponis al ŝi, realigi ĉiujn ŝiajn dezirojn.

- Nur tri deziroj estas miaj, diris la maljuna fraŭlino plorsingultante.

- Nome? demandis la Feino.

- Unue silkan divanon.

kaj tuj silka divano vidiĝis meze de la ĉambro.

- Due reefariĝi dudekjara.

kaj tuj ŝi estiĝis ĉarma blondhara junulino.

- Trie, ke mia kato transformiĝu en belan junulon, kiu sterniĝos apud mi sur la silkan divanon.

Je ĉi preciza momento, miaŭa voĉo ekaŭdiĝis:

- Vi nune amare bedaŭros, ke vi iam min alportis ĉe la veterinaron?

Esperantigis GOSO



Ĉar la esperantistoj, ĝenerale, havas grandan emon pri ĉio, kio koncernas etimologiajn problemojn, mi volas unualoke klarigi la devenon de la vorto "sardano".

Ĉar temas pri kataluna danco, mi devas menciigi ke ĝia katalunlingva nomo estas "sardana". En tiu lingvo, tiu lasta litero "A" estas prononcata laŭ sono kiu povus situi inter la esperantaj "A" kaj "E", konsekvence de tiu prononcmalmaniero, oni tradukis ĝin per la franca vorto "sardane", kvankam la franca muta "E" ne plene koincidas kun la kataluna sono.

La vorto "sardana" estas la ina formo de la adjektivo sardà, kio instigis kelkajn folkloristojn pensi ke ĝi devenas el la insulo Sardinio. Sed tio estas etimologie eraro. Ĉar katalune la konsonanto "C" estas prononcata same kiel "S", kaj la vokaloj "A" kaj "E" havas ĉiam egalan prononcon se ili ne estas akcentitaj; oni devas konkludi ke la dirita vorto devenas el erara ortografia transskribo de la vorto "cerdana", tio estas danco de la regiono cerdanja (francilingve Cerdagne), ĝuste najbara al la Princlando Andoro.

Ekzistas dokumentoj kiuj pruvas ke, en la 16-a jarcento, tiu ĉi danco, jam konata sub ĝis nuntempa nomo, estis tre populara en ĉiuj katalunaj regionoj. Tion ni vidos pli poste. Sed nun, ni ekzaminu kion diras al ni la arkeologio pri la malnovaj rondaj dancoj, kies parenco al sardano estas nedubebla.

Multaj folkloristoj opinias ke la originon de la sardano oni trovas en la malnova Grekujo. Oni trovas la unuan videblan reprezenton de ronda danco en iu argila skulptaĵo trovita en Paleocastro, Kreta Insulo, kiu datumas je la 15-a jarcento antaŭ Kristo, en kiu tri dancistinoj formas rondon ĉirkaŭ ludisto de liro. Pli poste oni trovas bildojn pri rondaj dancoj en grekaj ceramikaĵoj de la 8a, 7a kaj 6a jarcentoj antaŭ Kristo.

Tamen, ankaŭ ekster la greka kulturo oni trovas bildojn pri rondformaj dancoj, ekzemple en la Itala Ligurio (bronza erao) kaj en pluraj lokoj de Langvedoko, Katalunio kaj ĝenerale dise tra la Iberia Duoninsulo, el epokoj inter la 6a kaj la 3a jarcentoj antaŭ Kristo. Tio pruvas, ke antaŭ 26 jarcentoj la rondforma danco ekzistis ĝuste en la regionoj kie hodiaŭ ĝi estas konata per la nomo sardano.

Kelkaj el la bildoj sur ceramikaĵoj trovitaj en Langvedoko kaj en la Iberia Duoninsulo estas el kelta kaj ibera devenoj kaj kvankam la rondforma danco sendube havas grekan originon, oni ne povas nei la eblecon de variantoj enkondukataj de tiuj du popoloj, ibera kaj kelta: kiel ekzemplo mi diros, ke ankoraŭ antaŭ du jarcentoj unu el la muzikaj instrumentoj uzataj de la tipaj katalunaj orkestroj estis la sakfluto, tipe kelta instrumento kiun oni ankoraŭ uzas en keltidaj regionoj, kiel la franca Bretonio, la hispana Galegio kaj Skotlando, sed kiu komplete malaperis en Katalunio.

Ekde la roma invado ĝis la 13a jarcento ni ne trovas sufiĉajn dokumentojn pri la rondformaj dancoj en nia regiono. Tamen, tiu ĉi nesufiĉeco estas komuna al ĉiuj folkloraj manifestacioj. Jam en la 13a jarcento oni trovas bildon pri ronda danco sur telero trovita en Paterna, en la hispana regiono Valencia. La ikonografiaj dokumentoj plimultiĝas ekde tiu epoko koncerne tiujn rondajn dancojn. En la dekoraĵoj de la Katedralo de Girono, en la Abatejo de Montserrat, en fama fontano de Céret, ĉiuj de la 14a kaj de la 15a jarcentoj, oni retrovas bildojn pri danco maniero, tiu/

Jam en la 16a jarcento aperas la unua skribita mencio pri la nuntempa sardano, en kastillingva poemo de Antoni Lo Frasso, kiu donas al ĝi la nomon "cerdana", kiu montras kiel ni menciis parolante pri la etimologio de la nomo, ke tiuepoke oni konsideris tiun dancon kiel devenantan el la pirenea regiono Cerdanja.

Ankaŭ en la 16a jarcento ĝi estas ofte menciata de pluraj verkistoj, inter aliaj de la famkonata hispana aŭtoro Lope de Vega.

La Sardano, dum la mezepoko estis tre probable nur religia danco, ofte dancata interne de la preĝejoj mem. Tiu religia karaktero postrestis ĝis niaj tagoj: ankoraŭ oni dancas ĝin en kelkaj lokoj de la hispana Katalunio antaŭ religiaj skulptaĵoj okaze de religiaj festoj.

René LLECH-WALTER

(daŭrigota)

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal: 3^{me} Trimestre 1978

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes